EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

ENHAVO > ●AMO ĝismaje ● ILEI, UEA raportas ● Ĉinio ● Zome al Kongo ● JA < Jan. 24

# AMO ĝis la majo-fin'

UEA ĝojas unuafoje en sia vivo anonci la programon por la AMO-programo por la sekvaj kvin monatoj! Klare, ni survojas al rekorda jaro, dank' al la ekfunkcio de vere utila AMO-komisiono!

## AMO 82: Ĉinio kaj rejunigo

La programo estas jam anoncita, jan. 28 (vendrede) La parto de la seminario okazigita pere de Zoom okazos ekde 11:30 UTC
https://us02web.zoom.us/j/89943619514
Meeting ID: Kunsida identigito: 899 4361 9514
Passcode:Pasvorto: esperanto

Gravega temo por UEA: pli da junaj membroj tra Azio!

## AMO 83: Internacia amikeco

Jen la detala programo:

Stefan MacGill (Hungario): Enkonduko – tre mallonga
Barbara Pietrzak (Pollando): Historia fono de la Semajno de Internacia Amikeco.
Mireille Grosjean (Svislando): Nekredebla fido
KIMURA Goro Christoph (Japanio): Amikeco, kiu eltenas diferencojn: defio por Esperantujo
Milton Paulo de Lacerda (Brazilo): Amiko estas trezoro
Martina Kvarantan Šmitran (Kroatio): Amikeco sub lupeo
Monika Molnar kaj la lernantoj (Svislando): Infana percepto de amikeco.
Unuopaj ekzemploj de amikeco dank' al Esperanto kaj per Esperanto
Proklamo de la rezultoj de la foto-konkurso "Amikeco" (afiŝo sekvapaĝe)
Stefan MacGill: Fermo – same mallonga.
Koncertoj:: Ĵomart kaj Nataŝa (Svedio); Luis Obando kaj Jahir Cataño (Kolombio): Indiĝena Romanco, Kajto el Frislando.

Normale, estos ankaŭ tempo por diskuto!
Aldone: foto-konkurso kun la temo "Amikeco". Limdato: 13-a de februaro.




# **AMO 84:** Fervoja verdismo

Loko: Kulturcentro Greziljono. Kunlabore kun la franca IFEF-sekcio

Dato: Inter la 1a kaj 5a de aprilo.

Temo: Fervojo por daŭripova transporto

Kadro: La seminario okazas kadre de la subvencidona programo VERDEN

*SMG: Vane mi serĉis kaj petis informojn en Esperanto pri la projektoj 'Verden'.*

# **AMO 85:** AM-Astra

Loko: Israela kongreso, Tel Avivo.

Dato: Inter la 7a kaj 9a de aprilo.

Temo: Spacesplorado kaj Scienca agado. La diskutoj povos tuŝi ankaŭ pli da Faka Agado (sciencrilata, kiel ISAE, AIS, UMEA, Scienca Kalendaro ktp). Kredeble la temo de la nova teleskopo *Webb* povos roli.

# **AMO 86:** Fervojoj antaŭen

Statuso: sub aktiva diskutado.

Loko: Berouen, Ĉeĥio.

Dato: Inter la 7a kaj 9a de majo.

Temo: decidota; Kadro: La 73a Kongreso de IFEF.

Pliaj informoj: http: //ifef.free.fr/spip/spip.php?article412 kaj **http://kongreso.wz.cz**

================

Per tio la AMO-programo estas ĝis la fino de majo fermita. Proponoj ekde junio bonvenaj! Survoje al rekorda jaro!

================

## ILEI kaj nun UEA raportas regule kaj fidele

ILEI raportas jam de jaroj regule kaj fidele ĉiun trian monaton, dank' al la heroaj streboj de prezidantoj Mirejo Grosjean kaj Ahmad Mamduhi kaj sekretario Elena Nadikova. Pro tio, ILEI meritas la unuan lokon en nia prezentaĵo:

### ilei trimonata resumo jan 2022

**Kongreso 2022:** Okazos hibride en Kebekio, Kanado. LKK-anino Suzanne Roy estas en konstanta kontakto kun la universitato, kie okazos la Kongreso. Estas konfirmite, ke ĉambroj de la universitato povas esti menditaj nur pere de la LKK. UEA helpos pri la libroservo. Programo kompilata. Kun almenaŭ komitatkunsidoj, du-taga ILEI-Simpozio, lingva festivalo, internacia vespero, prezento de la sekva kongreso kun buso al Montrealo fine de la Kongreso.

**Juna amiko:** Festos sian 50an jaron en novembro 2022. Kampanjo en preparo.

**ILEI ĉe Unesko:** La Ligo aperis kaj aktivis en la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo kaj en ligita konferenco.

**ILEI aktiva en Jutubo!:** Ekde novembro 2021 la vic-prezidantino Alessandra Madella funkcias kiel unu el la administrantoj de la ILEI-kanalo ĉe Jutubo:

(https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI ).

Eblas alŝuti al la kanalo ĉiujn gravajn vide(et)ojn rilate al agado de la Ligo.

De oktobro 2021 ĝis januaro 2022 en la kanalo estis surretigitaj sekvaj materialoj:

- la alparolo de Maximiliano Garcia nome de ILEI dum la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo;
- la priskribo de la projekto “30 Oraj Horoj”, fare de Bruĉjo Kasini, estro de la LKK de Massa 2023, dum la evento Verden en Parmo; alia video por Verden fare de Inĝ. Franco Bressanin (utila preparmaterialo por AMO 84 en Greziljono.)
- video pri Hodler en Mostar fare de Mirejo G.;
- videoj pri origamo fare de Larysa Osadchuk
- prezenta filmo de la franca mezlernejo Victor Considerant (jam videbla en EKO)

# UEA raportas al sia Komitato kaj membroj

Du dokumentoj estis alŝutitaj al la komitata Teko:

[Raporto pri la progresoj de la Estraro dum aprilo-decembro 2021]

[Raporto pri la financa resanigo, januaro 2022]

Temas pri raportoj verkitaj de la Estraro por la Komitato.. Unu raportas pri la progresoj de la Estraro dum la menciita periodo, la alia raportas pri la progresoj de la Estraro post la decidoj faritaj de la Komitato en 2021 pri la Kongresa fako, la Libroservo, la Arkivo.

Se la rektaj ligiloj ne funkcias, bonvolu trovi ilin en la komitata elŝutejo https://uea.org/teko/komitato

# Nova Espero de Nia Movado en Ĉinio

10-jara jubileo de Shandong-a Esperanto-Klubo kaj adiaŭa kunsido de Geedzoj Bak Giwan okazis jarŝanĝe en la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang Universitato kaj hotelo Flora Marto en la urbo Zaozhuang. Pli ol 50 membroj el Zaozhuang, Linyi, Jining kaj Xuzhou partoprenis ĉi tiujn kunsidojn, kaj pli ol 20 membroj partoprenis per interreto. Raporto kun multaj fotoj estas alkroĉita.

# Zoma kurso por Kongo DR

Okazis la unua leciono pri Esperanto en la franca de la kurso deEsperanto por la studentoj de la universitato *Espoir*/Espero en Barako, Kongo DR. La kurson gvidas per *Zoom* bone konata franca instruistino, Françoise Noireau, kaj ĝi daŭras 90 minutojn ĉiusemajne.
Tio povas ŝajni io banala en Eŭropo aŭ en Ĉinio, sed problemas se vi devas organizi tion en regiono, en kiu ne ekzistas publika elektrosistemo. Danke al esperantista solidareco, tute aparte al la perado de AVE, la komencaj problemoj estis parte venkitaj. Dankon al la esperantistoj, kiuj kontribuis solvi la problemon kaj al nia Elisee Byelongo, rektoro de tiu ŝtate agnoskita universitato, kaj al la kursaro Tibor Sekelj, kiu disponigas sian Zoom-konton.  Se vi povas ankoraŭ helpi, donacu al AVE kun la indiko 'por universitato en Kongo'

========= vortoj: 885 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.